

Eŭropa Bulteno

Februaro 2017, Numero 168

RAPORTO PRI LA AGADO DE EEU EN 2016



Ekstera Agado

La Platformo por multlingveco plu ekzistis en 2015 kaj en ĝi plu estas EEU kaj E@I kun kune 4 membroj, sed bedaŭrinde ĝi pasiviĝis kaj okazis neniu kunsido. Bedaŭrinde, en tiu nura loko kie ni havas oficialan statuson kadre de EU-aj institucioj, eblis en 2016 fari nenion krom citi ties konkludojn.

En 2016 EEU zorgis pri efektiviĝo de nova projekto kadre de Civitaneco por Eŭropo financata de EU „Rakontoj el rememoro: Rememoroj pri elmigrintoj pro milito en Eksjugoslavio cele al konstruado de paca kaj tolerema mondo”. Ĝi ekrealiĝis en septembro 2016 kaj estas daŭrigata en 2017 ĝis septembro. EEU estas kunordiga organizo kaj partneroj estas Asocio por Eŭropa Konscio el Maribor (Slovenio), E@I el Partizanske (Slovakio), Asocio por kultur- kaj edukprojektoj el Berlino (Germanio) kaj Aŭstria instituto por infanfilozofio el Graz. La preparojn por la realigo de agadoj faris ĉiuj partneroj kaj nome de

EEU nia direktorino Maja Tišljár. Ĝi portos al EEU 22.500 eŭrojn kies parton ni uzos por la planitaj laboroj, sed antaŭvideble iom da mono restos por la aktivadoj de EEU ĝenerale. Tio ebligis ke EEU ankaŭ en 2016 estis finance pozitiva.

La portalo de la projekto Lingvo.info kiun ni finis pasintjare daŭre funkcias kaj multaj homoj informiĝas pri lingvoj en ĝi. Ĝi estas atingebla ĉe <http://lingvo.info/eo/>

Okaze de la Eŭropa Tago de la Lingvoj EEU dissendis inviton al la landaj asocioj pri festi ĝin kaj publikigi la aktivecojn. Ne multaj vere faris ion, tamen, ni ricevis dekon da informoj pri diversaj manifestaĵoj al tiu Tago dediĉitaj.

Maja kaj Zlatko Tišljár kun helpo de Maja Cimerman ellaboris komence de la jaro 7 projektojn por financado far EU ĉe Eŭropo por Civitanoj. El ili unu sukcesis.

La membroj de la estraro, sed ankaŭ aliaj aktivuloj kaj asembleaj membroj partoprenis en kelkaj neesperantistaj politikaj, sciencaj kaj interesorganizaj konferencoj kaj kunsidoj diverstipaj. Aparte elstaris la laboro de Jozef Reinvar kaj Petro Baláž en Slovakio. Ili havis plurajn renkontiĝojn kun politikistoj en Slovakio preparante kaj realigante UK en Nitra, internacian lingvo-politikan konferencon de Viŝegradaj ŝtatoj kaj interreligian forumon. La 31-an de marto ili gvidis en Nitra la unuan preparkunvenon de la Lingvo-politika Konferenco en kiu partoprenis politikistoj kaj sciencistoj de institucioj kiuj aŭspicis aŭ kunorganizas la konferencon.

Jozef kaj Petro dum la preparoj interalie havis kontaktojn kun ekstera ministro de Slovakio Miroslav Lajčák, kun eksa EU-komisionano Jan Figel kaj kun du membroj de la Eŭropa Komisiono: Tibor Navracsics kaj Vytenis Andriukaitis, kun la kabineto de la ŝtata prezidanto kaj kun urbestro de Nitra.



Parto de la estraro de EEU (Sean O Riain, Zlatko Tišljár kaj Jozefo Reinvar) havis apartan kunvenon kun eŭropa komisionano Vytenis Andriukaitis pri eblecoj kiujn li povus subteni cele al antaŭenigo de Esperanto. La kunsido okazis posttagmeze la 28-an de julio en la Universitato de Nitra. Nia prezidanto havis plurajn eblecojn diskuti kun la komisionano kaj kontaktis lin ankaŭ pere de lia sekretariino plurfoje antaŭ la konferenco kaj ankaŭ poste. La komisionano baze de helpo de nia prezidanto kunmetis grandan pozitivan paroladon pri Esperanto malfermante la konferencon. Li ĝin poste ankaŭ aperigis en sia oficiala portalo ĉe la Eŭropa Komisiono en Esperanto.. Reage al la interkonsento kun la komisionano ni ellaboris

du proponojn por la komisionano por estontaj iniciatoj ĉe la Eŭropa Komisiono kaj sendis al li. La estraro krome decidis distingi lin per honora membreco kaj proponis transdoni tiun distingon (medalo kaj diplomo) dum la E-kongreso en Germanio en Aŭgsburgo. Li ankoraŭ ne finkonfirmis la venon.

La Lingvopolitika konferenco de la viŝegradaj ŝtatoj (plus similpensantaj) okazis en Nitra (Agrikultura fakultato de la Universitato de Nitra) la 28-an kaj 29-an de julio sub la titolo „Perspektivoj de lingva komunikado en EU”. Partoprenis ĉirkaŭ 150 personoj el 15-o da landoj. Okazis 2 plenkunsidoj kaj tri kunsidoj de 3 subgrupj kiuj prilaboris tri aspektojn de la temo. La rezulto estas Nitra Deklaro, poste sendita al landaj parlamentoj de ĉiuj EU-ŝtatoj. La konferencon aŭspiciis la ekstera ministro de Slovakio Miroslav Lajčák kaj ĝi havis statuson de aranĝo ligita al slovaka prezidado de EU.

Kadre de UK pro iniciato de EEU estis organizita ankaŭ Interreligia ekumena forumo kun partopreno de 7 eklezioj kaj fakuloj (kun 150 partoprenantoj). Ĝin ĉefe oragnizis kaj prizorgis Jozefo Reinart.

Individuaj vojaĝoj: Seán Ó Riain partoprenis en lingvo-politika seminario en Novjorko la 22-an de aprilo. La seminarion organizis dro Humphrey Tonkin. Seán parolis pri lingva situacio en Irlando.

Zlatko Tišljár prelegis dum la 93-a Germana E-kongreso en Munkeno (13-16-a de majo) pri „Eŭropa identeco – kiel krei kondiĉojn por ke eŭropanoj sentu EU sia?” kaj en KAEST (17-an de novembro) pri la „Perspektivoj por E en EU” en Modra/Harmonia (Slovakio). Zlatko Tišljár prelegis ankaŭ dum OSIEK-konferenco en kroatia urbo Osijek pri „Kiel solvi la nunan politikan krizon en Eŭropo?” la 18-an de julio.

Sean O Riain partoprenis la 4-an de novembro en solena debato okaze de la 20-jariĝo de Asocio por Eŭropa Konscio en Maribor kaj prelegis pri irlanda lingvo kaj ankaŭ kadre de la samurba E-societo pri sia diplomatia kaj E-a vivo. Li ankaŭ prelegis dum KAEST en Modra/Harmonia.

Ĉi-jare bedaŭrinde ne okazis Ekonomia Forumo en pola Krynica en kiu regule dum 10 antaŭaj jaroj partoprenis ankaŭ EEU pro novaj politikaj cirkonstancoj.

Gravaj atingoj por Esperanto en Eŭropo en kiuj EEU ne rekte partoprenis:

Nova reta kurso learn.esperanto.com stimulata de EEU kun la celo ke en la jaro 2017 ĝi havu ĉiujn lingvojn de EU, ĝis la fino de la jaro jam aperis en 18 lingvoj inter kiuj 13 eŭropuniaj. La retportalon starigis en majo berlina esperantisto kaj komputilisto Georg Jaenig kaj plu prizorgas ĝin. Ĝia kvalito estas ke ĝi estas la plej rapida metodo por atingi parolbazon de Esperanto kaj ĝin oni baldaŭ povos uzi en ĉiuj EU-aj lingvoj. Temas pri dekdulecna kurso laŭ la Zagreba Metodo kun interaktivaj ekzercoj.

Nun jam du-jara reta E-kurso kadre de granda portalo duolingo plu kolektas rekordojn. Ĝis la jarfino la anglan version de la kurso komencis uzi pli ol 700.000 lernantoj kaj startis ankaŭ la hispana versio kun 20.000 kursanoj ĝis la jarfino. La kurso estas revolucia por kresko de parolantoj de Esperanto grave influante ankaŭ la eŭropan Movadon.

Grupo da entuziasmuloj el Pollando sub la gvido de Halina Komar sukcesis organizi E-partoprenon en la plej granda internacia junulara manifestaĵo Woodstock en Pollando. Dum 7 tagoj sur la loko kie kunvenis 300.000 gejunuloj staris du grandaj tendoj kun E-informoj kaj

kursoj, kie daŭre deĵoris esperantistoj. Tie eksciis pri Esperanto unuloke la plej eble granda kvanto da homoj, ĉefe gejunuloj.

Menciindas ankaŭ agado de Pola E.D.E. kiu vivigis la komisionon por Esperanto kadre de Pola Parlamento. Post la lastaj politikaj balotoj en Pollando en kiu novaj politikistoj prenis la povon, kiuj ne subtenas E-on, la komisiono iom da tempo ne funkciis.

Enmovada Agado



En 2016 la ĉefaj administrataj devoj estis organizitaj kadre de la 101-a Universala Kongreso en Nitra (Slovakio), kie okazis du kunsidoj de la asembleo kaj unu kunsido de la estraro de EEU. La ferma kunsido de la asembleo kun 13 asembleanoj traktis la 24-an de julio la raportojn kaj aprobis ilin kaj tuŝis la planojn por 2016. En la malferma kunsido partoprenis pli ol 100 personoj – interesitoj pri la eŭropa E-movado, membroj de la UK. En ĝi

oni raportis pri la agadoj kunlabore kun EU-politikistoj kaj ĉefe pri la gravaj kunlaborrilatoj kun V. Andriukaitis, eŭropa komisionano, kaj diskutigis eblajn novajn vojojn.



Dum la UK okazis ankaŭ unu kunsido de la estraro, kiu diskutis pri aktualaj problemoj kaj elektis Andriukaitis HONORA MEMBRO DE EEU. Ankaŭ la estraro decidis lanĉi eŭropan kampanjon inviti landajn asociojn organizi laŭeble multajn aranĝojn ligo al UNESCO kaj Zamenhof. La dua estrara kunsido okazis en Modra/Harmonia en Slovakio la 19-an de novembro, kie ni diskutis preparojn por la elekta kunveno de la asembleo en 2017.

EEU-estraranoj, ĉefe Flory Witdoeck kaj Sean O Riain deĵoris dum la Movada Foiro ĉe la stando de EEU informante pri niaj agadoj. Flory Witdoeck partoprenis ankaŭ en la laboro de UEA-Komitato. Sean O Riain kaj Zlatko Tišljar estis ĉefaj panelistoj en la enonduka kunveno

dum la UK, kiun prezidis Mark Fettes, prezidanto de UEA, kiu estis dediĉita al perspektivoj de Esperanto en Eŭropo en postbritelira tempo.

Nia prezidanto tre aktive partoprenis en preparoj de la Lingvopolitika konferenco „Perspektivoj de lingva komunikado en EU” kaj kune kun Jozefo, Hunphrey Tonkin, Mark Fetes kaj Michele Gazzola preparis la proponojn de konkludoj de la subtemaj grupoj kaj de la Nitra Deklaro.

La Eŭropa Bulteno regule aperis 11 fojojn (julia-aŭgusta numero estis komuna) ĉiu je 12-18 paĝoj. Ĝin ni publikigis en la paĝaro de EEU www.europo.eu. Kopie ĝi aperas ankaŭ en la retejo de Remuŝ. Redaktis Zlatko Tiŝljjar.

La kunlaboro kun UEA estis tre bona: Ni interkonsentis ke ni kunorganizos la konferencon lingvopolitikan kaj interreligian forumon dum la UK kaj niajn asembleajn kunsidojn por kiuj UEA disponigis al ni senpage necesajn salonojn. La sekretario kaj la prezidanto aktivis en la listo de Komisiono de UEA por Eŭropo kaj ankaŭ ĉefpanelis dum la unua tema kunsido de la UK pri Esperanto post Briteliro (24-an de julio). Petro Baláž verkis artikolojn por UEA-revuo Esperanto-Revuo kaj en ĝi estis intervjuata.

La landa agado estis kontentiga. Ni invitis la landojn al kelkaj iniciatoj okaze de la Eŭropa Lingva Tago kaj kampanjo organizi laŭeble multajn aranĝojn lige al Zamenhof kaj UNESCO-invito memori pri li 100 jarojn post la morto.

Bona kunlaboro pludaŭris kun Germana E-Asocio, kiu plu administras salajron de nia direktorino Maja Tiŝljjar. Kaj la sekretario reprezentis EEU ĉe la malfermo de Germana E-kongreso en Munkeno kaj prelegis kadre de kongresa programo.

La estraranoj regule kunlaboris kaj partoprenis en E-aranĝoj de landaj asocioj en siaj landoj: Zlatko Tiŝljjar en Slovenio kaj Kroatio, Flory Witdoeckt en Belgio, Petro Balaž en Slovakio kaj Ĉeĥio, Sean O Riain en Aŭstrio.

Krome ni realigis preskaŭ ĉiujn punktojn de nia laborplano por 2015.

Prizorgadon de la retpaĝaro plenumis Maja Tiŝljjar.

Ankaŭ la tuta administrado (prizorgo de dokumentaro, ellaboro de novaj projektoj kaj raportoj, prizorgo de financoj, estis plene plenumita, kion prizorgis Maja Tiŝljjar, Flory Witdoeckt kaj Zlatko Tiŝljjar. La estraro ankaŭ preparis ampleksan laborplanon por 2017-a jaro kiu aperis en la novembra numero de EB.

Financoj

La kotizpagado en 2015 estis pli bona ol en antaŭaj jaroj: Pagis plimulto de la asocioj.

La jaro finance estis, bona, ĉar ni ricevis unuan parton de pagoj por nove aprobita projekto far Eŭropa Fondaĵo Civitaneco en Eŭropo. La direktorino daŭre zorgas pri ellaboro de novaj projektoj kaj partopreno en pluraj konkursoj.

Flory Witdoeckt ellaboris la financon raporton por la financaj instancoj de Belgio por 2015 kaj por la asembleo en Lillo. Ŝi daŭre librotenas la tutan financon laboron.

Ni sukcesis pluteni la profesion laboron de Maja Tiŝljjar (kiu ricevas salajron en Germanio, kie ŝi loĝas pro kontrakto inter EEU kaj GEA). Tio tre gravas, ĉar la kondiĉo por ricevi financadon kaj pli grandajn projektojn estas ke la asocio jam havas almenaŭ unu profesiulon kaj la amplekso de laboroj ĉiam pli vastiĝas.

Zlatko Tiŝljjar, sekretario de EEU
Februaro 2017

WikiTrans – LA ANGLA VIKIPEDIO EN ESPERANTO



Vikipedio estas unu el la plej konataj retejoj en la mondo, kaj nuntempe estas uzata multe pli ol tradiciaj enciklopedioj en libroformo. Kiel tuto, ĝi enhavas grandan parton de la scioj de la homaro, kaj ĝi estas pli aktuala kaj pli facile alirebla ol presitaj libroj. Krome ĝi estas "demokrata" en la senco, ke ĉiuj povas kontribui aŭ kontroli, kaj ke scio estas alirebla ankaŭ por malriĉuloj sen granda lerneja aŭ universitata biblioteko. Tamen, la sciokvanto en Vikipedio estas tre malegale distribuita inter la lingvoj, kaj la angla sekcio, kun 5 milionoj da artikoloj, kovras 20-foje pli da kapvortoj ol ekzemple la esperanta kaj la dana vikipedioj, kun nur iom pli ol 200.000 artikoloj.

Krome, la individuaj esperantaj artikoloj estas ofte multe pli malgrandaj ol iliaj anglaj analogoj, malpli dense fontigitaj kaj bildumitaj, aŭ simple t.n. "ĝerموj", kun nur mallonga difino, kaj sen enciklopedia enhavo.

La projekto

La celo de WikiTrans (<http://epo.wikitrans.net>) estas alirebligi al esperanto-parolantoj la suman, enanglan scion de Vikipedio ankaŭ tradukite en Esperanto. Kompreneble sen perdi la originalajn artikolojn, kiuj tamen jam ekzistas en la internacia lingvo. Tia traduktasko ne eblas per homforto, kaj necesas maŝintradukado. Tial la iniciinto de WikiTrans, la dana lingvoteknologio-firmao *GrammarSoft ApS*, kunlabore kun *University of Southern Denmark* (Suddana Universitato), lanĉis en 2010 plurjaran esplorprojekton pri altkvalita maŝintradukado de la angla al Esperanto. Parte pro netradicia (gramatika anstataŭ statistika) aliro al la problemo, kaj parte pro la aparta fleksebleco de Esperanto kiel cellingvo, tiu projekto tre bone sukcesis, kaj la tradukitaj tekstoj estas unuavide apenaŭ distingeblaj de originalaj tekstoj.

Ekde la unua tradukrondo en 2010-2011, WikiTrans ĉiutage re- aŭ nov-tradukas ĉ. 40.000 artikoloj por certigi aktualecon de la informoj kaj tradukteknologio. Por tio ĝi uzas 10-maŝinan komputilaron kun 40 kernoj, grandparte donacitajn de *Esperanto Studies Foundation* kaj prizorgatajn de Suddana Universitato. La traduksistemo nomiĝas GramTrans, kaj kombinas profundan lingvistikan analizon (Constraint Grammar) kun kontekstdependaj tradukreguloj. Eblas vidi la gramatikajn analizojn por ajna frazo en la retejo <http://visl.sdu.dk> kaj konsulti la vortarojn de la sistemo en <http://xl.wikitrans.net>.

La retejo kaj serĉinterfaco

Ĉar la materialo de la WikiTrans-retejo estas plene antaŭtradukita, kaj ne nur tradukita por serĉata kapvorto, eblas trovi serĉvortojn ne nur kiel kapvortojn, sed ankaŭ en la tekstoj mem, do eĉ se ankoraŭ ne ekzistas aparta artikolo pri la temo. Krome kompreneble eblas serĉi kaj la esperantan kaj la anglan kapvortojn. Aldone, la Lucene-bazita serĉinterfaco kapablas ordigi la trafojn, ilustrante ilin per teksteroj. Disambiguado de plurobla kapvorto estas kromefiko de tio, kaj ne necesas plusendo-paĝoj por rilataj serĉvortoj aŭ sinonimaj esprimoj, kiujn plejparte facile trovas kaj religas jam la normala serĉilo. Por grandaj temoj, kun kaj originala (esperanta) kaj tradukita (angla-esperanta) artikoloj, ambaŭ integriĝas per komuna enhavomenuo, kaj vi havas aliron al la suma tekstaro kaj bildaro de ambaŭ. Estus dezirinde,

se la originala Esperanto-Vikipedio simile ofertus krommontri WikiTrans-artikolon, precipe por ĝermo-artikoloj, sed ĝis nun ĝi nur pluligas, kiam mankas artikolo entute.


Reviziado de artikoloj

Sen reviziado aŭ reverkado, WikiTrans-artikoloj kompreneble simple restas tradukoj, kaj kvankam ili ne estas citaĵoj en la strikta senco de la vorto, ili retenas la saman enhavon kaj aŭtoreco-historion kiel la origina angla Wikipedia artikolo. Tial, bone-malbone, WikiTrans-artikolo elmontras la samajn fortojn kaj malfortojn, kvalitojn kaj erarojn kiel la originalo. Ankaŭ necesas atentigi, ke la tradukoprocezo mem foje enkondukas kelkajn ambiguĵojn aŭ eĉ erarojn. Tial ni ofertas la eblecon mem redakti/korekti WikiTrans-tradukojn kaj enigi ilin en la originalan Esperanto-Vikipedion per speciala redakt-interfaco (<http://gramtrans.com/editor/>). Detalan manualon pri kiel uzi la redaktinterfacon vi trovas en la artikolo pri WikiTrans mem (http://eo.wikipedia.org/wiki/WikiTrans#La_revizia_interfaco). Tamen, eĉ bone reviziita artikolo en la originala Esperanto-Vikipedio ne igas la paralelan WikiTrans-artikolon superflua, ĉar ĉi-lasta - male al la originala - aŭtomate retradukiĝos, kiam okazas ŝanĝoj aŭ aldonoj.

La vortaroj

WikiTrans uzas la vortarojn de la GramTrans-tradukilo, kaj vortara laboro estas granda parto de la projekto. La ĉefa angla-esperanta vortaro nun havas 192.000 kapvortojn, multaj el ili kun pli ol unu traduko, kaj kuntekstaj reguloj kiel elekti la ĝustan tradukon. Krome GramTrans kapablas krei novajn kunmetaĵojn el anglaj vortĉenoj, traduki certajn tipojn de nomoj kaj heŭristike traduki latin-grekajn sciencajn terminojn. Se vi volas helpi pri la vortara laboro, vi povas tion fari en speciala vortaro-interfaco (<http://xl.wikitrans.net/>), kiu administras i.a. datumbazon de 400.000 anglaj plurvortajoj. La sistemo proponas 10 hazardajn vortojn al vi kaj petos vin kontroli la proponitan tradukon, aŭ aldoni propran, novan. Alternative vi povas mem serĉi aŭ proponi vortojn.

Ekzemplo (el la tradukita artikolo pri "Tigro")




La plej proksimaj vivantaj parencoj de la tigro antaŭe laŭsupoze estis la leono, leopardo kaj jaguaro, ĉiuj el kiuj estas klasigitaj sub la genro *Panthero*. Genetika analizo indikas ke la tigro kaj la unco deturniĝis de la aliaj *Panther* specioj antaŭ proksimume 2.88 milionoj da jaroj, kaj ke ambaŭ specioj povas esti pli proksime rilatitaj al unu la alian ol al la leono, leopardo kaj jaguaro.

La plej malnovaj restaĵoj de formortinta tigroparenco, nomita *Panthera zdanskyi* aŭ la Longdan-tigro, estis trovitaj en la Gansua regiono de nordokcidenta Ĉinio. Tiu specio estas konsiderita kiel fratintaksono al la recenta tigro kaj vivita antaŭ proksimume 2 milionoj da jaroj, komence de la Plejstoceno. Ĝi estis pli malgranda ol la moderna tigro, esti la grandeco de jaguaro, kaj verŝajne ne havis la saman mantelpadronon. Malgraŭ estado konsiderita pli "primitiva", la Longdan-tigro estis funkcie kaj eventuale ekologie simila al it moderna kuzo. Ĉar *Panthera zdanskyi* vivis en

nordokcidenta Ĉinio, kiu eble estis kie la tigrogenlinio originis. Tigroj kreskis en grandeco, eventuale en respondo al adaptaj radiadoj de predecoj kiel cervoj kaj bovedoj kiuj eble troveblis en Sudorienta Azio dum la frua Plejstoceno.

La plej fruaj fosilioj de veraj tigroj estas de Java, kaj estas inter 1.6 kaj 1.8 milionoj da jaroj aĝaj. Apartaj fosilioj estas konataj de la fruaj kaj mezaj plejstocenaj sedimentoj en Ĉinio kaj Sumatro. Subspecio nomita la Triniltigro (*Panthera tigris trinilensis*) vivis antaŭ proksimume 1.2 milionoj da jaroj kaj estas konata de fosilioj trovitaj ĉe Trinil en Java.

Tigroj unue atingis Hindion kaj nordan Azion en la malfrua Plejstoceno, atingante orientan Beringion (sed ne la amerika Kontinento), Japanion, kaj Sahaleno. Kiel konstatite fare de Sandran Herrington, kelkaj fosiliaj kranioj kiuj estas morfologie apartaj de leonkranioj povis indiki tamen ke tigroj eble ĉeestis en Alasko ene de la lastaj 100,000 jaroj dum la lasta glaciejo. [16] Fosilioj trovitaj en Japanio indikas ke la lokaj tigroj estis, kiel la pluvia insulsubspecio, pli malgrandaj ol la kontinentaj formoj, ekzemplo de insula naneco. Ĝis la Holoceno, tigroj ankaŭ vivis en Borneo, same kiel sur la insulo Palavano en Filipino.



PAROLADO DE VYTENIS ANDRIUKAITIS TRADUKATA AL PLURAJ LINGVOJ

Stefano Keller entreprenis tre subtenindan iniciaton stimuli tradukkapablajn esperantistojn el ĉiuj EU-landoj por traduki al sia lingvo la paroladon de eŭropa komisionano V. Andriukaitis kaj malfermis la paĝaron en kiu ili ĉiuj estos libere legeblaj en la reto. Tio estas grava iniciato, ĉar la parolado estas la plej pozitiva takso de E-movado iam ajn skribita de tiel alta politikisto kaj indas ĝin rekomendi por legado ĉie en Europo. Ankaŭ la estraro de EEU invitas ĉiujn kiuj pretas fari tion, anonci vin al Stefano Keller por demandi ĉu en via lingvo la artikolo jam ekzistas. Se ne, vi estas petata fari tion.

http://www.linguistic-rights.org/eo/pri_ni.html

Zlatko Tišljarić

ASEMBLEO DE EEU KAJ EŬROPA KONFERENCO “ZAMENHOF-ANTAŬULO DE HOMAJ RAJTOJ”

Kiel jam anoncite, en 2017 ne okazos aparta kongreso de EEU sed nur kunvenoj de la asembleo kaj aparta konferenco dediĉita al Zamenhof pro 100-jariĝo de lia morto. Tio okazos kadre de la ĉi-jara kongreso de Germanaj Esperantistoj en Freiburg (suda Germanio).

Ni invitas ĉiujn membrojn de la asembleo de EEU aliĝi al la kongreso kaj veni al niaj aranĝoj sed ankaŭ partopreni en la programoj de la Germana E-kongreso.

Ĉi tie mi nur prezentas programojn rilatajn al EEU:

1. Eŭropa konferenco “Zamenhof – antaŭulo de homaj rajtoj” (3-an de junio 10-12-a h.)
2. Asemblea kunsido (nur por la asembleanoj) al kiu la asembleanoj estos aparte invititaj (la 4-an de junio 9-11-a horo)
3. Asemblea kunveno por la ĝenerala kongresanaro: Perspektivoj de Esperanto en EU post Briteliro” (la 4-an de junio 14-16-a horo)

Pliaj informoj: http://www.westermayer.de/manfred/GEK-2017_unua-bulteno.pdf

Pri la kotizoj kaj loĝadoj <https://www.esperanto.de/de/enhavo/gea/94-deutscher-esperanto-kongress-2017>

Maja Tišljarić

AKTIVECOJ KADRE DE KAMPANJO »ZAMENHOFA JARO«

Hispanio:

La prezidanto de Hispana Esperanto-Federacio, José Antonio del Barrio, prelegis pri doktoro Zamenhof, lia verko kaj ideoj en la Centro Sefarad-Israel de Madrido, institucio kreita de la hispana Ministerio pri Eksterlandaj Aferoj por flegi la rilatojn kun la juda kulturo, kaj kies sidejo troviĝas en historia palaco en la strato Mayor de Madrido.

La evento estis organizita por kunmemori la Jaron Zamenhof, okaze de la 100a datreveno de la forpaso de la iniciatinto de la lingvo Esperanto, kaj dum ĝi estis pritraktita ankaŭ la konekto

de L.L. Zamenhof kun la juda kulturo de lia tempo kaj la historia kunteksto de lia verkaro kaj idearo: <https://youtu.be/5aFoyYYhZ3o>
Miguel Gutiérrez

Kroatio:

Kroataj esperantistoj komencis siajn aktivecojn per iformado. En januaro kaj februaro jam prezentiĝis du televidaj elsendoj pri Esperanto en la tutŝtata ĉefa televido. Unue la 31-an de januaro en kanalo HRT3 estis prezentita 15-minuta elsendo pri Esperanto kadre de rubriko »Prilingvaj notoj« kaj la 28-an de februaro kadre de la populara programo »Bonan matenon« (Dobro jutro) en HRT1 5-minuta ĝenerala informo pri Esperanto. Ambaŭ vi povas spekti en la blogo de Kroata E-Ligo ĉi tie: <http://www.esperanto.hr/renkontoj.htm>.
Anto Mlinar

POLA PARLAMENTA GRUPO SUBTENE AL ESPERANTO REAKTIVIĜIS

La 9-an de februaro 2017 en Pola Parlamento (Sejmo) okazis la kunsido de Parlamenta Grupo de la lingvo Esperanto (PGLE) kiun gvidis la prezidantino de PGLE Anna Wasilewska. Tio jam estis la kvara laborsesio. Estis invititaj i.a: hungara gastulo Laszlo Szilvasi kiu prelegis historie pri la situacio de Esperanto en Hungario de la 1966, pri la juro, leĝoj, datumoj, sperto kaj pri la nuna stato de E-o. La dua gastulo la honora konsulo de Respubliko Peruo Kajetan Pyrzyński prelegis pri la enkonduko de Esperanto en ok klasoj de la Elementa Lernejo n-ro 7 en Poznano (Pollando). La projekto daŭras jam du jarojn. Ĉeestis ankaŭ prezidanto de Pola Asocio Eŭropo - Demokratio - Esperanto Eduardo Kozyra kaj eks-prezidanto de Varmia-Mazuria Esperanto-Societo Marian Zdankowski.



Eduardo Kozyra nome de d-ro Robert Biedroń kiu estas la Urbestro de Słupsk (Pollando) invitis la parlamentanojn al la inaŭguro de la Zamenhofa Jaro en Słupsko kiu okazos la 6-an de aprilo 2017 en Urbodomo de Słupsko - tiam okazos i.a. la oficiala malfermo de E-ekspozicio "130 JAROJ de ESPERANTO". Por la sekvonta kunsido de PGLE estis invititaj prof.

d-ro hab. Edmund Wittbrodt, la antaŭa Prezidanto de PGLE (dum la jaroj 2012-2015) kaj prof. Xie Nong - rektoro de la Privata Ekonomia Universitato en Pekino.

<https://www.facebook.com/photo.php?fbid=10209728785355022&set=pcb.10209728787355072&type=3&theater>

Eduardo Kozyra

PRINTEMPaS EN GREZILJONO



de la 14-a ĝis la 22-a de Aprilo 2017
en la kastelo Grésillon (Francio)

- * Esperanto-kursoj por ĉiuj niveloj
- * Aktivadoj kaj ekskursoj
- * Seminario AMO (16-20 de Aprilo)
- * Prelegoj kaj atelieroj
- * Trapasu esperanto-ekzamenojn (ILEI)

instruos, gvidos kaj prelegos :

					
Zsófia KORÓDY	Christophe CHAZAREIN	Marion QUENUT	MIREILLE GROSJEAN	SARA SPANO	Stefan MACGILL

Aflugu de Londono por malpli ol 50€

De la 14a ĝis 22a de aprilo 2017 en la franca E-kastelo **Greziljono**

okazos la 6-a staĝo **PRINTEMPaS** kun proksimume 40 partoprenantoj kaj loga programo:

- Kurso A1-A2 gvidata de Marion Quenut (Francujo)
- Kurso A2-B1 gvidata de Christophe Chazarein (Francujo)
- Kurso B1-B2 gvidata de Zsófia Kóródy (Herzberg, Germanujo)

- **AMO-seminario** (C1) « Kiel modernigi la instruadon de Esperanto kun la novaj teknikaĵoj ? » gvidata de Stefan MacGill (Hungarujo) kaj Sara Spano (Italujo)
- Internaciaj Ekzamenoj de ILEI-UEA (21-22.aprilo)
- Prelegoj de Mireille Grosjean (Svisujo)

Informoj: gresillon.org/printempas

Aliĝo: gresillon.org/aligho

posta programo: gresillon.org/agendo

Bert Schuman

ALVOKO DE UEA LABORI POR GAZETARA KAMPANJO »ZAMENHOFJARO«

UEA serĉas administrajn helpantojn!

La Estraro de UEA decidis pri speciala gazetara kampanjo okaze de la "Zamenhofjaro". La celo estas informi plejeble multajn gazetojn, radiostaciojn, televidstaciojn, retpaĝojn aŭ blogojn pri Zamenhof kaj Esperanto.

Por tiu tasko UEA serĉas administrajn helpantojn, kiuj kune organizu la koncernan kampanjon. Unu el la plej gravaj taskoj estas la kolektado de kontaktinformoj de amaskomunikiloj el ĉiuj partoj de la mondo kaj posta kontaktado kaj informado al kaj pri la koncernaj amaskomunikiloj. La koncernaj homoj havu komputilon kaj lerton uzi ĝin, la kapablon rapide serĉi kaj esplori la interreton kaj laŭeble rapidan tajp-kapablon (ja temas pri registrado de datumoj).

UEA serĉas kaj volontulojn kaj homojn, kiuj pretus labori kontraŭ eta honorario. Se vi interesiĝas pri kandidatiĝo, bv. sendi informojn pri vi (eta vivresumo, kapabloj, konoj, lingvokonoj, movada historio) al al zamenhofjaro100@gmail.com. Bv. menciigi kiom da tempo vi planas elspezi pri la tasko kaj kiajn rimedojn kaj eventualajn rekompencojn vi bezonus kaj kiom ili kostus.

UEA

SIMPOZIO EN POZNAN KUN LA TEMO: LERNANTO EN LA LINGVOLERNA PROCEZO

La 8-an de februaro 2017, meze de la tutsemajna studprogramo de la Interlingvistikaj Studoj kaj Instruista Trejnado okazis tuttaga simpozio kun la temo: "*Lernanto en la lingvolerna procezo*". La aranĝon organizis prof. Ilona Koutny kaj partoprenis ĝin la studentoj de la du kursaroj, ties prelegantoj kaj ankaŭ kelkaj, nur por tiu tago alvenintaj, gastoj.



La tuttagan programon malfermis la vicdirektorino de la Lingvistika Instituto de la Universitato UAM, prof. Grażyna Demenko. La 14 prezentaĵojn de 12 spertuloj el ses landoj (Brazilo, Hungario, Italio, Nederlando, Pollando kaj Usono) kun intereso sekvis pli-malpli kvindekmembra publiko. Post la malferma prelego de Duncan Charters el Usono, prelegis laŭvice Vilmos Benczik (HU), Renato Corsetti (GB), Przemysław

Grzybowski (PL), Grażyna Szubryczyńska (PL), Krystyna Worobiej (PL), Małgorzata Komarnicka (PL), Katalin Kovats (NL), Blazio Wacha (HU), Stefan MacGill (HU), Fernando Pita (BR), Ilona Koutny (PL) kaj denove Renato Corsetti (GB) kaj Blazio Vaha (HU). Kadre de la postsimpozia kulturvespero la ĉeestantoj en kortuŝa kaj inda memorfesto omaĝis al la ĵus forpasinta profesoro de la Interlingvistikaj Studoj, Zbigniew Galor kaj spektis prezenton de Przemek Grzybowski pri sociologia temo „Projekto Belen”.

Fotojn pri la aranĝo vi povas vidi en la publika [Facebook-paĝo de edukado.net](https://www.facebook.com/edukado.net)
La raporto de Stefan MacGill, kun mallongaj resumoj elŝuteblas [ĉi tie](#).

Katalin Kovats

Oficiala organo de Eŭropa Esperanto-Unio.

Pri la enhavo respondecas la aŭtoroj.

Finredaktita: la 28-an de februaro 2017

Redaktoro: Zlatko Tišljár

En la numero kunlaboris: Zlatko Tišljár, Eckhard Bick, Maja Tišljár, Anto Mlinar, Miguel Gutiérrez, Eduardo Kozyra, Bert Schuman, Katalin Kovats

Kontakto: ztislar (ĉe) gmail.com

Retpaĝo: <http://www.europo.eu/eo/europa-bulteno>

